# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN ☎ 34.22.18

JARA ABONO : 10 F

C.C.P. 956-28 Montpellier

1-a Kvaronjaro 1983 — N° 85


# RAPORTO PRI LA FEDERACIA KONGRESO

Ĝi okazis en Carcassonne, la 19-an kaj 20-an de Marto 1983-a. Ĉeestis proksimume 50 personoj, interalie reprezentantoj de la Federacio Midi-Pyrénées, kies kongreso ankaŭ okazis samloke kaj sammomente. Ni emfazos ankaŭ la ĉeeston de Doktoro ALBAULT, Prezidinto de U. F. E., akademiano kaj de Renée TRIOLLE, sekretario nacia kaj reprezentanto de Provenza Federacio.

La sabata kunveno estis uzita por prepara debato al la morgaŭa asemblo. Vespere, amuzan skeĉon prezentis al ni F-inoj ALBAULT, kaj poste Bulgara Samideano vojaĝigis nin en sia belega lando.

Dimanĉe, la ĝenerala kunveno celis prepari la laboron por la venonta jaro. Parto de la debato, tamen, estis deciĉita al teoria modifo de la statutoj, celanta mallongigon de la estraranaj postenoj. Post longa inter-diskutado, la propono fariĝis malaprobita.

Jen listo de la praktikaj decidoj de la Federacio, pri kiuj ni alvokos ĉies helpon :

- Eldonado de libr(et)oj, ĉu literaturaj, ĉu lingvaj.
- Organizo de stud-semajnfino la 18-an kaj 19-an de Junio1983-a, por perfektiĝantoj (dua-grado, atesto pri kapableco). Ni organizos la ekzamenojn, respondajn al la kursoj.
- Turisma gvidlibro estas preparota. Nun ni devas kolekti ĉiujn informojn pri hoteloj, restoracioj, vidindaĵoj... Jen nomoj de la respondeculoj : AUTHIER? TERRAL (Béziers - BORQUE (Carcassonne) - ROCHER (Espalion) - FRUS, SOULIER (Nimes) - GERARD (Perpignan) - OSTER (Toulouse). Ĝenerala kunordiganto : J. HENIN.
- Eble organizo de staĝoj de U.F.E., ĉu lingvaj, primovadaj..

La Kongreso aldonis oficialajn demandojn kaj bondezirojn al U. F. E. ESTRARO, interalie pri la kotizsistemo, pri la rezultoj de la kampanjo "Les 10 rendez-vous avec la langue internationale". Ni ricevis respondon dum la nacia kongreso.

Reprezentis la Federacion S-o MAURIN kaj S-o HENIN.

Ĉiuj grupas respondeculoj ricevis detalan raporton. Petu ĝin de ili aŭ mendu ĉe S-o MAURIN, 20 rue de l'Aiguillerie - 34 000 MONTPELLIER - kontraŭ 4 poŝtmarkoj.

# VIVO DE LA GRUPOJ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

## Montpellero

Nova sango venas al grupo de Montpellier. F-ino VIERNE restas prezidantino de la grupo, sed fariĝis sekretario S-o CALLET, anstataŭ S-o CAPUS kaj kasisto S-ino CELIQUA, anstataŭ S-o MAURIN. Al ili, la federacio deziras plenan sukceson por la venonta laboro, precipe por la organizo de la Internacia Semajno en SETE.

Pri tio, ni rememorigas al la legantoj ke la Internacia semajno en SETE okazos de la 11-a ĝis la 18-a de septembro 1983-a, ĉe am^en la tre plezuriga "Maison Familiale du LAZARET". ĉiujn informojn kaj aliĝilojn vi bonvolu peti de la Montpellier-a Grupo, kies oficiala adreso interalie, ŝanĝiĝis. Jen la nova :

CENTRE CULTUREL ESPERANTO
Centre Intrenational des Jeunes
Impasse de la petite Corraterie
34 000 MONTPELLIER.
Tel : (ĉe la sekretariino) (67) 42 58 30

Venonta kunveno de la grupo okazos la 2-an de Majo, je la 20h45, ĉe la sidejo de la grupo, (15 rue du Faubourg Figuerolles).

# Federacia Estraro

Prezidanto, estrarano pri administrado kaj rilatoj kun U. F. E.
S-o MAURIN Frèderic
20 rue de l'Aiguillerie
34 000 MONTPELLIER.
Tel : (67) 66 - 21 - 01

Vic-Prezidanto, estrarano pri akcepto de eksterlandanoj :
D-ino VIERNE Yvette
5 rue du Docteur Roux
34 000 MONTPELLIER.
Tel : (67) 54- 15- 43

Vic-Prezidanto, estrarano pri librosecvo kaj turismo :
S-o HENIN Jean
Beauregard
Route de Montcayroux
48 500 La CANOURGUE.
Tel : (66) 32 - 86 - 36

Sekretario,
S-o AMOUROUX Jean
1 rue de Sorède
66 000 PERPIGNAN.



Kasistino,
S-ino NEGRON Lucette
Chemin des Amandiers
34 400 LUNEL.

Bèziers : Espéranto, 9 rue Picot - 34 500
Tel : (67) 31 - 13 - 18

Carcassonne : S-o BORQUE, 6 rue Pablo Neruda - 11 000
Tel : (68) 25 - 45 - 13

Montpellier : Espéranto, CIJ, imp. petite Corraterie - 34 000
Tel : (67) 42 - 58 - 30

Nimes : Espéranto, 10 Grand-Rue, 30 000
Tel : (66) 64 - 19 - 74

Lozère : S-o HENIN, Beauregard, rte de Montcayroux, 48 500 la Canourgue
Tel : (66) 32 - 86 - 36

Perpignan : Espéranto, 72 av. de Gaulle - 66 000 Tel : (68) 34 22 18
aù S-o AMOUROUX, 1 rue de Sorède - 66 000 Tel : (68) 67 41 27

## ✱ SPECIAL POUR DEBUTANTS ✱

Vient de paraître "FACILAJ DIALOGOJ". C'est un livret de cinquante-six pages, format A4, qui comprend douze dialogues faciles, suivis de questions et rèponses didactiques, le tout avec une traduction parallèle en français. Une cassette d'accompagnement comprend l'enregistrement de tout le texte en espéranto.

Le tout constitue pour un dèbutant, un excellent outil d'étude ou de perfectionnement de la langue Internationale Espérantiste.

Dans ce livret, l'élève peut toujours avoir recours à la traduction en français pour lui faciliter la comprèhension du texte, tandis que la cassette lui permet de se familiariser à la prononciation de l'espèranto et ainsi apprendre à parler dans la langue.

+ Le livret "FACILAJ DIALOGOJ"
prix franco : 29.00 francs.

+ La cassette d'accompagnement LG/3
prix franco : 33.00 francs.

Les interréssés peuvent commander à cette adresse :

S-o GROSSMANN André
5 rue des Pyrenèes
68 390 VAL DER SHEIM
CCP STRASBOURG 81 934.


# KAMPANJO

## *LES RENDEZ-VOUS AVEC LA LANGUE INTERNATIONALE*

Oficialan respondon pri la rezultoj de tiu kampanjo ni ricevis dum la nacia kongreso, okazinta en Romans la 1-a ĝis la 5-a de Aprilo.
Nombro da unuaj rendevuoj : 100.000
" " aliaj " : inter 1000 kaj 2000

La afero devus esti profitodono post vendo de 40 000 unuaj kaj oni vendis 60 000. Do, favora buĝeto.

Inter 200 kaj 500 unuaj rendevuoj revenis.
Inter 10 kaj 30 atingis 10-an rendevuon.
Inter 5 kaj 10 personoj aliĝis la perkorespondan kurson de U. F. E.



# LA GRESILONA KULTURDOMO


Jen programo de la kultura domo de GRESILLON, por la somera periodo :

- "Konferencoj kaj kursoj". 02.07 - 22.07
  kursoj kaj prelegoj pri komunikado. Vizito de la regiono.
- Esperanto-Rendevuo. 23 kaj 24.07
  Organizita de L. F. Koop.
- Kursoj. 25.07 - 07.08
  trinivelaj kursoj.
- Artisanat et Esperanto. 08.08 - 21.08
  foto, ceramiko, kartonaĵoj .... en esperanto.
- Rencontre de non-voyants. 22.08 - 03.09
  Organizas FUBE. Ankaù malfermita kunveno al neblinduloj.

ĉiujn informojn vi petu de jena adreso :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
Grésillon - 49 150 BAUGE.
Tel : (41) 89 - 10 - 34

## * PRI TURISMO *




Kion do? ĉu la afero estas fiaskanta? Malmutaj preparis panelon, kvankam tio aspektas malpeza laboro. Do, ni relanĉas la ideon, espereble ĉi-foje kun plia sukceso. Por ĉiuj informoj, sin turni al Federacia Cirkulero, aù rekte al J. Hénin, Beauregard, 48 500 La CANOURGUE Tel : (66) 32 - 86 - 36.

La temoj ĝenerala restas "Jaro de la Komunikadoj", sed multaj eroj ne estis ankoraù disvolvigitaj, interalie : Esperanto faciligas vojaĝon kontaktojn kun alia kulturoj, akiron de modernaj sciencoj; ĝi ebligas dialogon inter Nordo kaj Sudo; Ankaù estas problemoj pro superpotenca lingvo.... Do, ni ĉiuj iru al la laboro por la sukceso de tiu entrepreno.

# KRUCVORTOJ

## Horizontale ✻

1 – Afrika birdo simila al perdriko
2 – Franca rivero — Vetkuro (R) — 1^ (R)
3 – Gaso verdete flava, uzata por blankigo aŭ senifektigo — Tio estas afero de antikvaĵisto (R)
4 – Genro de simioj el tropika Ameriko (R) – En ia loko
5 – En littuko — Helena vir(in)nomo (R)
6 – Ĝi malhelpas la malfermon de pordo — Negi
7 – En la komenco de ovacio – Mezurunuo – Seksetrompi
8 – Teksaĵo (R) – Adverbo – Platformo ĉe masto (R)
9 – Elementa instruo pri iu sciaro – Ĝoje
10 – Vicmontra numeralo – Moviĝi direkte al iu aŭ io – Sufikso.
11 – Tiri al si la atenton – Forsendi el la patrujo
12 – La magia antaŭis la kinon – Ricevinta sian definitivan skriboformon (R)



R. RAYNAUD (1982)

## Vertikale ✻

1 – Eksmoderna danco – Konjunkcio
2 – "Kiu", aŭ kio, aŭ kia – Vicmontra numeralo.
3 – La plej altaj kartoj – Mankloko en histo (R) – Ĉe la vendado (R)
4 – P.P. matematiko: orta – Familiare: fripone almeti akvon en trinkaĵon por pli profiti
5 – Montara balkana regiono ĉe la norda bordo de Adriatiko – En iu loko
6 – Ŝirmilo – Pronomo
7 – Falfolia pingloarbo – Rilata al la lingvo de la skandinavaj popoloj de la mezepoko ĝis 1360 (R)
8 – En la fino de krucmilitiro – Konjunkcio – Nombro inversita.
9 – Greko el ciklado j – Teksaĵo malpeza kaj travidebla (R)
10 – Adjektiva participa finaĵo – Glathaŭta persiko (R)
11 – Famoj klaĉoj – Levo (R)
12 – Prepozicio – Tre danĝera batalgaso (R)

✻ (R) nur radiko

✻ Solvo de la antaŭa problemo

V
Solvo de la Krucvortoj aperinta sur la n° 82

| | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| K | O | R | P | O | G | A | R | D | I | S | T |
| I | D | E | A | L | O | ■ | A | I | R | O | ■ |
| R | O | Z | K | O | L | O | R | A | ■ | M | P |
| O | R | I | ■ | G | O | B | E | L | I | N | O |
| M | A | S | T | O | ■ | S | C | E | N | A | R |
| A | S | T | R | ■ | S | T | O | K | ■ | N | T |
| N | ■ | A | O | R | T | A | ■ | T | ■ | B | U |
| C | I | N | A | M | ■ | K | O | ■ | J | U | G |
| I | N | C | ■ | K | A | L | I | G | U | L | A |
| I | T | A | L | ■ | M | O | D | E | L | I | L |
| S | E | ■ | A | B | I | ■ | ■ | K | I | S | I |
| T | R | A | M | ■ | K | I | L | ■ | O | M | O |


# 5 minutoj de paùzo




*Doktoro, kia estas mia malsano ?*





*Mi vidis unue la aùtomobilon !*




*Mia fundamenta veraĵo estas : « Vivu kaj lasu vivi ».*



*Vere, karulino,*
*ni estas malfortaj ni denove cedis al tentoj.*



*...mastro, mi havas problemeton en zoo ! ...*



*SEN VORTOJ*

1983

Al tiuj kiuj pensas, ke turismo signifas renkonton kun aliaj homoj, popoloj, kaj ke esperanto povas havi ne kompareblan rolon koncerne turismon S-o Jean HENIN proponas al esperantistoj, kiuj posedas veturilon "kaj prefere tendon aù ruldomon" viziton de Centra Europo kaj eventualan viziton de la Universala Kongreso en Budapeŝto.

Jen la du karavanoj proponitaj :
- tri-semajna vojaĝo - 24/7 ĝis 14/8 -
- du-monata vojaĝo tra sudaj Germanio, Aùstrio, Hungario, kaj post-kongreso al Suda Pollando.

Informas S-o HENIN Jean
Beauregard
Route de Montcayroux
48 500 La CANOURGUE
Tel : (66) 32 - 86 - 36 -

# Malkovro de RUMANIO


Esperanta "Hongara" samideanino el Rumanio, kiu vivas en Rusiljono de kelkaj monatoj - ne parolante la francan lingvon - Konsentas priparoli, prezenti sian landon ĉe grupaj kunvenoj.

Do laù propono de ĉeestinto de nia federacia kongreso oni povas skribi al ŝi proponante ĉu repagon de la vojaĝkostoj, ĉu gastigadon ... laù ebleco de la grupo, ĉar nia prelegontino estas senlabora " eĉ se laborema".

Tiu ebleco ŝajnas ege interesa por montri al la neesperantistaro, ke esperanto ekzistas kaj plie utilas.

Efektive ŝi hejme devas paroli facilan nedenaskan lingvon (ĉar ŝi parolas la Rumanan, Hungaran kaj Rusan kaj ŝia kunvivanto parolas la Hispanan, la Francan kaj la Katalunan).

Ŝi povas prezenti al ĉiuj esperantistoj kiuj ne parolas de-naske ŝian lingvon, sian landon pere de nia neùtrala lingvo.



Informas : S-o MAURIN Fréderic
20 rue de l'Aiguillerie

34 000 MONTPELLIER
Tel : (67) 66 - 21 - 01

## Lastmomente


La Vaukluza pikniko okazos en COLONZELLE (apud GRIGNAN) dimanĉon la 8-an de Majo 1983 .

Informas : Centre Culturel Esperanto
M. J. C. Croix des Oiseaux
84 000 AVIGNON.

# *Ĉinaj libroj por infaneco*

S-o LENTAIGNE kore dankas la dekon da kamaradoj, kiuj helpis lin sendi al ĉinio pli ol 200 "Kiel Diri" kaj kiuj Kompense ricevis porinfanajn librojn.

Tiuj libroj estas ankoraŭ havablaj, almenaŭ jenaj :



| | |
|---|---|
| - Noveloj de Lusin | 24.00 |
| - Nezha kirlas la maron | 10.00 |
| - Pesi elefanton | 14.00 |
| - Cevalido transiras... | 3.00 |
| - Ruza Griza Lupego | 2.00 |
| - Kapti vulturon viva | 4.20 |
| - Konstrui novan ponton | 3.10 |
| - Neĝa infano | 5.50 |
| - Simioj provas elakvigi lunon | 4.00 |
| - Rakontoj pri Afanti | 6.00 |

Por akiro de tiuj tre interesaj libroj, sin turni al :

S-o LENTAIGNE
3 avenue de la Gaillarde
34 000 MONTPELLIER.

bonvolu aldoni afrankitan koverton.

# LINGVA SEMAJNFINO PRINTEMPA

Unu el la decidoj de nia lasta federacia kongreso estas organizo de lingva semajnfino, por prezenti al la membroj eblecon perfektiĝi lingve. ĉi foje, ĝi celas venigi kaj komencantojn (dua grado) kaj perfektiĝantojn (tria grado).

Tiu semajnfino okazos la 18-an kaj 19-an de Junio 1983-a, tutcerte en GRUISSAN. Jen skiza programo :

++ SABATE, 18-an de Junio

| | | |
|---|---|---|
| 10h | : | Akcepto |
| 10h30-12h30 | : | Diversnivelaj kursoj. |
| 12h30 | : | Tagmanĝo. |
| 14h-15h | : | Prilingvaj kaj prigramatikaj konferencoj. |
| 15h-17h30 | : | Libera tempo (banado...). |
| 17h30-18h30 | : | Kursoj. |
| 20h30 | : | Distr(eg)a vespero kun skeĉoj, kantoj kaj .. surprizoj. |

++ DIMANĈE, 19-an de Junio

| | | |
|---|---|---|
| 9h-10h30<br>11h-12h | : | Diversnivelaj kursoj. |
| 12h30-14h | : | Komuna manĝo. |
| 14h30-15h30<br>15h45-16h45 | : | Ekzamenoj, kursoj aŭ konversacioj... |
| 17h | : | Aŭdiaŭa kunveno. |

Ekzamenojn ni povos organizi, ĉar efektive pli kaj pli mankas lingve kapablaj homoj en la movado. Tamen nur la tri unuajn ekzamenojn de Franca instituto eblos trapasi.

Pri loĝ- kaj manĝ- eblecoj, informojn vi ricevos post nelonge. Sed jam aliĝu al tiu semajnfino (sciigante se vi trapasos ekzamenojn).

Adreso : MAURIN, 20 rue de l'Aiguillerie - 34 000 MONTPELLIER.
Tel : (67) 66 - 21 - 01

Venonta numero aperos la 30-an de Junio 1983-a.

Artikolojn vi bonvolu sendi antaŭ la 16-an de Junio al S-o R. Frus, Groupe Scolaire "Vaillant", 12 rue Daumier - 30 000 NIMES.

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

**Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES**

Dépot Légal : 1er Trimestre 1983

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes